

Kanto Novjara

Dum tra novjara noktomez'  
jam lune glitis ŝove  
ne gapu lunon, knab', sen ĉes',  
komencu vivi nove.

Ĉi tion ĉiam diras mi  
en tiu nokt' sorĉfama.  
Post jarkomenco, aĥ, fikci',  
plu ĉio estas sama.

Mi kiel vivis, vivas plu  
kaj velkas boninteco,  
el tuta boninteca flu'  
ne venas jam eĉ penso.

Al azenet' min ligas am'  
ĝi en malriĉ' humilis  
kaj membrojn al Jesuinfan'  
per spir' varmigi iris.

Mi boni volis en konkur'  
kun tiu dia besto  
krom akvotrink' manĝanta nur  
la kardojn en modesto.

Ĉi-jare ankaŭ mia spir'  
Krist-manojn fridajn blovis.  
Jesuinfan' kun trista mir'  
medite lipojn movis:

„Kie vi estis ree, knab',  
vol' via febla, vana!“  
Hontiris mi kun klina kap'  
de kripo Kristinfana.

Tradukis  
Jiří Kořínek  
1. 1. 1957.

ESPERANTISTA KLUBO en Praha kunvenas ĉiumerkrede en Praha II, Ve Smečkách 26 je la 20-a horo. De la 19-a horo perfektiga kurso, gvidata de s-ano A. Slanina. JUNULARO de la Klubo kunvenas ĉiumarde en Praha II., Krakovská 21, IIIa etaĝo je la 19-a horo.

Programo:

9. 1. Novaĵoj el nia monda gazetaro.
- 16.1. Ni kantas, legas el nia literaturo, diskutas.

### POPOLA UNIVERSITATO HONORE AL L. L. ZAMENHHOF.

En la jaro 1957 /la 14-an de aprilo/ rememoras la tutmonda esperantistaro la morton de L. L. Zamenhof. Tiu ĉi nobla homo forlasis nin antaŭ 40 jaroj meze de la Unua mondmilito. Lia vivo ĉesis, lia verko venkas barojn plej diversajn kaj ne malproksima estas la tago reala de nia alta celo. Por honorigi la vivon kaj verkon de la Majstro, Esperantista Klubo en Praha aranĝas por sia membraro.

popolan universitaton

kun jena definitiva programo:

- 23.1. Jaroslav ŠUSTR - Josef VÍTEK: Malfermo de la Universitato, klarigo de ĝiaj celoj.  
Antonín SLANINA /Praha/: Vorto parolata kaj skribata en Esperanto.
- 30.1. František PYTLOUN /Poděbrady/: Impresoj kaj rememoroj de mia unua ĉeesto ĉe Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo.
6. 2. Václav ŠPŮR /Doksy/: Internacia lingvo – potenco batalilo en manoj de l' oratoro.
- 13.2. MUDr. Josef ČERNÝ /Litoměřice/: temo ankoraŭ ne anoncita.
- 20.2. Jiří KOŘÍNEK /Brno/: Manplene el mia tirkesto /miaj literaturaj laboroj kun monroj el mia originala kaj traduka poezio/.
- 27.2. JUDr. Tomáš PUMPR /Praha/: Rimoj en la esp. poezio.
- 6.3. Josef KOŽENÝ /Kutná Hora/: Dormo kaj sonĝoj.
- 13.3. Dolfa BARTOŠÍK /Praha/: Praktika aplikado de Esperanto.
- 20.3. Vladimír SLANÝ /Ostrava/: Nia movado en la regiono de Ostrava dum lastaj tri jardekoj.
- 27.3. PhDr. Augustin PITLÍK /Praha/: Unuaj jaroj de la esperantista movado en Prago kaj en ĉeĥoslovakaj landoj.
- 3.4. Josef VONDROUŠEK /Brno/: Ĉeĥa violon-arto novtempa.
- 10.4. Rudolf HROMADA /Praha/: En nia Klubo antaŭ kvindek jaroj.
- 17.4. Ing. Ladislav KRAJÍC /Tábor/: Maŝinoj por mekanizado de terlaboroj /kun lumbildoj/.
- 24.4. Miloš RUDOLF /Olomouc/: El prahistorio de l' homo.
- 8.5. Štěpán URBAN /Praha/: Aventuroj de la Spirito.
- 15.5. František OMELKA /Otrokovice/: temo ankoraŭ ne anoncita.
- 22.5. Eduard V. TVAROŽEK /Martin/: Miaj spertoj el edukado de mia filo kiel denaska esperantisto.
- 29.5. PhDr. Jaromír JERMÁŘ /Praha/: Kelkaj problemoj de la moderna filozofio.
- 5.6. JUDr. Vladimír MOHAPL /Olomouc/: Proleta internaciismo kaj la problemoj de internacia lingvo.
- 12.6. Jiřina HOLÁ /Praha/: Kun farbo kaj peniko en la naturo /rememoroj el la vivo de signantoj de turistvojoj/.
- 19.6. Jaroslav ŠUSTR-Josef VÍTEK: Fermo de la Popola Universitato.

-----

ATENTIGO! Dum la prespretigo de la plano por la Popola Unversitato hazarde ni ellasis por la dato la 19-an de junio la temon kaj prelegonton. Ni petas kompletigi la planon jene:

19.6. Vuk ECHTNER /Praha/: J. A. Komenský

- - -

NIAJ MEMBROJ KAJ AMIKOJ.

En la pasinta numero de nia organo ni rememoris niajn kvindekjarulojn s-anojn Jiří Kořínek el Brno kaj Pavol Rosa el Bratislava. Kun ĝojo, kvankam malfrue ni informas nian legantaron, ke en decembro festis sian kvindekjariĝon emitenta membro de nia klubo, homo konata en la esp. tutmondo Dro Tomáš PUMPR.

Liaj meritoj estas nepritakseblaj, speciale tiuj en la sfero literatura. La 6-an de decembro festis sian 55-an vivjaron la kluba prezidanto Jaroslav ŠUSTR, sen kiu estas nia esperantista vivo en ĈSR dum la lastaj jardekoj neimagebla. Ni ĝojas al ambaŭ niaj karaj membroj esprimi la plej sincerajn bondezirojn. Forta sano kaj vivkontento daŭre ilin akompanu!

Same en februaro /la 4-an/ atingas sian 50-an vivjaron meritplena gvidanto de nia movado en la regiono de Ostrava, amiko Vladimír SLANÝ. Pli ol tri jardekojn li dediĉas siajn fortojn al Lingvo Internacia. Li akceptu amikajn gratulojn de la tuta ĉeĥoslovaka esperantistaro!

-

TRISTA SCIIGO atingis nin el Olomouc. La 29-an de decembro mortis la estro de Urba Nacia Komitato, granda subtenanto kaj amiko de nia movado. TKKE forsendis al la Urba Komitato jenan kondolencon: Radě MěNV-Olomouc, k rukám tajemníka s. Beneše, Olomouc.

Jménem Celostátního Esperantského Poradního Sboru republiky Československé vyslovujeme Radě Městského národního výboru v Olomouci hlubokou soustrast nad skolem předsedy MěNV v Olomouci s. Antonína ELIÁŠE, vděčně vzpomínajíce jeho pomoci a aktivní spolupráce na řešení otázek, týkajících se esperantského hnutí v Olomouci i v celé naší vlasti.

Josef Vítek, předseda

Miloš Rudolf, tajemník

- - -

AL LA ABONANTOJ DE „LA PACDEFENDANTO“.

Post la likvido de L. P. mi transdonis la adresojn de ĉiuj L. P. – abonantoj al la Esp. klubo en Praha, kiu afable sendos al vi sian „BULTENO“n, en kiu vi trovos sub la signo „LP“ kontribuajojn por la Esp-pacmovado, liveratajn de pacdefendantojn en ĈSR kaj eksterlando. Mi esperas, ke neniuj el niaj ĝisnunaj abonantoj malaprobos tiun decidon. Sincera kunlaboro nur povas gvidi nin al komuna venko. Tion vi ĉiuj certe deziras.

La kluboj ne havas abonantojn, sed nur membrojn. La jarkotizo por tiuj estas Kčs 24 por 1957. La klubo laŭleĝe devas sian Bultenon liveri al la membroj senpage. Tamen vi devas kompreni, ke al nemembroj la klubo ne povas liveri senpage sian organon. Sekve nun dependas de vi, eksabonantoj de L. P. ĉu vi fariĝos membroj por ricevi regule la Bultenon de la klubo, aŭ vi povas sendi pere de aldonita pagilo libervolan kortizon /donacon/, kiel vi ĝis nun pagis por „LA PACDEFENDANTO“ kaj la klubo al vi ankaŭ sendos regule sian BULTENON. Mi deziras al tiu ĉi kunlaboro plenan harmonion kaj sukceson. Mi firme estas konvinkita, ke tia kolektiva kunlaboro en la jaro 1957 alportos por nia landa movado la de ĉiuj sopiratan venkon.

Rudolf BURDA

- - -

SCIIGO DE LA REDAKCIO.

La prezidanto de TKKE kaj tiu de la klubo ricevis pli ol 230 bondezirojn okaze de Kristnasko kaj jarŝanĝo. Kvankam inter ili estis la salutoj al ni speciale karaj kaj ŝatataj, ni decidiĝis dediĉi ĉiun liberan minuton al nia pormovada laboro. Ĉar la alvenintaj poŝtaj deziroj kaj demandoj reprezentas

nun pli ol 7 kilogramojn kaj nur sporade troviĝas helpantoj, vi, ĉiuj niaj karaj amikoj pardonos al ni certe, se ni uzas nur tiun ĉi manieron por sincere premi viajn manojn kaj danki pro viaj bondeziraj vortoj, kiuj estas por ni vortoj sukcesaj! Kiam nia celo estos atingita kaj ni iom pli liberaj, nia letero trovos sian poŝtvojon al vi! Ĝis tiam: plej sincerajn salutojn al vi okaze de la jarŝanĝo. Ni ĉiuj havu solan specialan deziron pri laŭeble plej baldaŭa tegmento por nia movado! Viaj

Josef Vitek & Jaroslav Šustr

---

**Praha-ek-1956-45-04**

BULTENO PRAHA 45 1956

- 04 -

NI RECENZAS, KOMENTAS, LEGIS POR VI...

NOVAJ LIBROJ. La senlaca eldonej *S t a f e t o* /J. Régulo Pérez, Kanariaj Insuloj/ prezentis en la ĵus pasinta jaro al la Esperanto-publiko siajn sesan kaj sepan libron, kiuj ambaŭ estas verkoj de granda valoro.

La unua el ili estas ESEJOJ /unua volumo-Beletro/ de Gaston Waringhien /236 paĝoj/. Eksperto pri literaturo, Akademiano, lerta stilisto, poeto kaj lingvisto gvidas kun scienca erudicio la leganton en ĉarmaj ĉapitroj tra niaj famaj verkoj kaj verkistoj, prilumante ilin el novaj, nekutimaj flankoj per sia sprito kaj unikeco de sia rigardo.

La dua libro de Stafeto estas filozofia epodo, grandioza poemo, originale verkita de William Auld: LA INFANA RASO, kun ilustraĵoj de la pentristo Pierre Lavallo /106 paĝoj/. La poeto esprimas sian mondkoncepton en densaj, kompaktaĵoj, plenaj de kapturaj rigardoj al la pozicio de la homa raso, ankoraŭ nematura, infana, meze de la horizontoj de la kosma kaj tempa infinito.

Pu

ĈEĤA POETO EN LA ĈINA LINGVO. Ni jam raportis pri tio, ke Esperanto estas en alta grado uzata kiel helpilo ĉe la enkonduko de la ĉeĥa literaturo en la ĉinan lingvon. En la lasta numero de la ĉinlingva revuo *I-Wen* estas ĵus publikigita artikolo pri nia poeto Petr Bezruč kun traduko de ses el liaj Sileziaj Kantoj, fare de Li-Laojon. Estas la poemoj: Maryčka Magdonova, Ostrava, Já, Slezské lesy, Ty a já, Horník. La artikolo mencias la helpon de la ĉeĥaj esperantistoj.

„POLLANDO“. Ĝus atingis nin la 11-a /27-a/ numero de tiu ĉi luksa revuo denove en Internacia Lingvo eldonita. Perfekta lingvaĵo, eleganta koverto, moderna grafikarto donas al tre interesa vorta kaj bilda enhavo sian specialan karakteron pri grandstila verko de hodiaŭo. Ĉar la Asocio de Esperantistoj en Pollando promesas eldoni regule „Pollandon“, ni esprimas nian veran ĝojon. Ĝis nun ne estas finkoresponditaj ĉiuj detaloj, sed interesuloj povas ĝin provizore mendi je Kčs 5 por unu ekzemplero ĉe s-ano Jar. Šustr, Dlouhá 10, Praha I.

Jelč-

Nova, luksa, riĉe ilustrita revuo redaktata nur en Esperanto abonpagebla! NUNTEMPA BULGARIO estas ĝia nomo. La unuan numeron ni atendas ĉiumomente. Abonkondiĉoj kaj la prezo tre favora! Verŝajne nur 7,30 Kčs jare! Mendu ĝin tuj, la kluboj mendu ĝin amase: Administracio de NUNTEMPA BULGARIO, str. Levski 1, SOFIO, Bulgario! Ni estas pretaj ankaŭ kolekti la adresojn de interesuloj kaj helpi al disvastigo de tiu revuo. Esperantista Klubo en Praha.

ANKORAŬ „MARYŜA“. Pasintjare Verda Ĉaro de Julio Baghy partoprenis la distriktan konkurson de teatraj amatoraj grupoj kaj prezentis la konatan dramon de fratoj Mrštík „Maryša“ en esper. traduko de Eva Seemannová. Antaŭ monato Fako por lernejoj kaj kulturaj aferoj de la konsilantaro de

Distrikta Nacia Komitato en Praha 2 valore pritaksis altan kvaliton de Verda Ĉaro kaj alsendis al ĝi rekonan diplomon, kiu ĉeĥe tekstas:

Dramatický kroužek Esperantistů při Osvětové besedě v Praze 2 zúčastnil se soutěže Lidové Umělecké Tvořivosti v Praze v oboru divadelním a umístnil se v okresním kole.

Odbor pro školství a kulturu rady ONV v Praze 2

Ni esprimas nian sinceran gratulon pro la akirita meritita sukceso.

EKP

-

BIBLIOGRAFICKÝ KATALOG ČSR ČESKÉ KNIHY 1956 el la 15.9.1956 mencias sur la 18-a paĝo, ke fama poemo MAJO de K. H. Mácha aperis inter aliaj lingvoj ankaŭ en Esperanto.

Hr.

-

### **Praha-ek-1956-45-05**

BULTENO PRAHA 45 1956

- 05 -

LA ARTVESPERO DE LA VERDA ĈARO. La „Verda ĉaro de Julio Baghy“, la teatra kolektivo de la Esperantista Klubo en Praha honoris la 12-an de decembro 1956 la naskiĝtagon de la Majstro per prezento de du gravaj teatraĵoj.

La unua estis la drameto en versoj de Marjorie Boulton ĈE L' AKVO DE FORGESO, kiu antaŭ unu jaro ricevis la unuan premion de la Belarta Konkurso kiel Esperanta originalaĵo /la teksto estas trovebla en la revuo Esperanto, j. 1956, Nro 1/. Sur sobre ekipita scenejo /reĝisoro Seemann/ disvolviĝis antaŭ niaj okuloj epizodo ĉerpita el la greka mitologio, pri la genia kantisto kaj muzikisto Orfeo, kiu penetris eĉ en la regnon de la mortintoj, por reakci sian edzinon Eŭridico, sed li perdis ŝin la duan fojon kaj definitive. Ĉi tie kontinuas la verko de Boulton kaj finrevas la miton ĝis la venko de la fidela amo, kiu rompas eĉ la katenojn de la morto.

La gardistoj de la subtera regno de l' mortintoj impresis en sia nehomeco kiel maŝinoj de la senindulga fera Fato. Kaj en tiun mornan, sengajigan submondon revenas Eŭridico, ĵus rabita la duan fojon for de sia amata Orfeo, sed ŝi rifuzas trinki la akvon de la forgeso el la rivero Leteon. Ŝia roze-verda grekstila vestaĵo sur la cetera senkolora scenejo estis kvazaŭ ekkrio de vivanta homa koro kontraŭ la nevenkeblaj blindaj forte de l'pereo. En la tute senesperiga situacio tuŝis la koron la vortoj de Eŭridico, jen plenaj de kredo, jen de rezignacio, ĝis ŝia sinofera amo reakiris perditan edzon.

En la dua parto de la vespero estis prezentata la lastatempa dramo de Julio Baghy DUM TONDRAS LA KANONOJ /verkita por la Verda ĉaro kaj dediĉita al ĝia gvidantino Eva Suchardová-Seemannová/. Estas epizodo el moderna milito, plena de teruro, kiam malamika armeo penetras en urbon, ĝis ĝi estas post unu tago denove elpuŝita. En la atmosfero, en kiu miksiĝas la timo, senpovo kaj malamo, subite elradias ideo de interhoma kompreno kaj celkonscia espero, kiam Ullo, vundita malamika soldato, ekkonas en sia flegantion Ria, sian samideanan korespondantinon kaj fianĉinon. Kaj tiu ĉi firma humanisma fido ne forlasas la spektantojn eĉ kiam la bataloj plu daŭras, la kanonoj plu tondras kaj denove disigas la Junon gehomojn. La signifon de la dramo substrekis la senintence insista aktualeco pro la ĵusa endanĝerigo de l'paco kaj ĝi helpis al tio, ke la unuaranga prezento de la geaktoroj postlasis en ni longdaŭran fortan emocion.

Tiu ĉi inda Zamenhofa vespero denove pruvis la eminentajn kvaliton de la Verda Ĉaro, en kies kolektivo ni ĉi tie vidis ne nur la jam bone konatajn kaj plurfoje proviĝintajn membrojn, sed ankaŭ tute novajn esperigajn talentojn.

Por tiuj, kiuj ĉeestis la novan neforgeseblan prezenton de la Verda Ĉaro, estis la arta vespero granda plezuro kaj ili trovis en ĝi la pruvon pri la forto de la Zamenhofaj ideoj. Sed estas nekompreneble, ke tiuj, por kiuj unualoke estis la peno oferita, venis en malmulta nombro: nome la membroj de la Klubo, dum ĉeestis samideanoj de tre malproksimaj lokoj /eĉ el Slovakio/, kaj ankaŭ multaj neesperantistoj. El tiu ĉi sperto estas necese preni instruon por la estonto kaj dediĉi por la varbado

de la spektantoj la saman penon, kian senprofite dediĉas la membroj de la Verda Ĉaro al la arta ellaborado de siaj prezentoj. La Verda Ĉaro estas jam sperta kolektivo, kiu povas sin prezenti al la internacia publiko, kaj se tio ne estas ankoraŭ ebla, estas necese subteni ĝian strebadon almenaŭ per la intereso kaj inda rekono de la samlandanoj.

Pu

-

UNIVERSO ĈIRKAŬ NI. La 19-an de decembro faris nia klubanaro interesa promenon tra la sunsistemo, al kiu invitis ĝin per sia samtitola prelego s-ano Vladimír Kočvara, kunlaboranto de Popola Observatorio en Rokycany. Ni admiris la fakan scion pri la temo, prezentita en flua Esperanto. Oni pripensas proponon realit ekskurson de niaj klubanoj al tiu ĉi observejo.

Ni rekomendas al amatoraj astronomoj en la mondo kontakti kun la observatorio. La adreso: s-ano Vladimír Kočvara, Obvodní lidová hvězdárna, nám. 82, Rokycany, Ĉeĥoslovakio.

JM

### **Praha-ek-1956-45-06**

BULTENO PRAHA 45 1956

- 06 -

NEWS /A Soviet Review of Word Events/ en sia novembra /21-a/ numero havas tre interesan artikolon „Write to Us in Esperanto“, en kiu la leganto ekscias pri sukcesa vojo de Esperanto en UdSSR, pri ĝiaj fundamentaj principoj kaj pri sovetiaj aŭtoritatoj, kiuj plene aprobas Esperanton. La kontaktoj pere de Esperanto estiĝas ĉiam pli oftaj, vastaj kaj sinceraj, speciale inter la tutmonda studentaro. Kiel utila ilo por firmigi la amikecon kaj pacon inter la popoloj ĝi estas plene aprobata kaj en la artikolo rekomendata.

Jelĉ-

-

Ankaŭ en „PROBLEMY“, monata popularscienca revuo pollanda /Nro 12/1956/ kun tre granda intereso ni tralegis longan artikolon Esperanto w Polsce /pĝ 907-910/, kiu akcentas lastjarajn atingiĝojn, inter ili ĉefe la XIII-an kongreson en Varsovio kaj la tradukojn el pola literaturo en Esperanton /ekz. Marta de E. Orzeszkowa el Esperanto tradukita en la japanan estiĝis deviga legato en japanaj lernejoj, estis en Japanujo filmita ktp./ Du paĝoj montrak faksimile de la letero de L. L. Zamenhof, lian Unuan lernolibron en pola lingvo /Varsovio 1887/, titolpaĝojn de Sinjoro Tadeo, Mazepa, de opero Halka, La Faraono, Pola Antologio, Eŭgeno Onegin, Peer Gynt, La fera Kalkanumo, Romano de San Michele. Tre favora artikolo el la plumo de neesperantisto Czeslaw Nowicki aldonas ankoraŭ du bildojn; tombon de la Majstro kaj lian monumenton en brazila urbo Belo Horizonte. Ni gratulas al niaj amikoj en Pollando pro similaj sukcesoj!

Jelĉ-

-

Sergej Ostrovjov:  
LA NILO VOKAS...

Dum tempo, kiam el nebulo  
fulm´ faktiva penas lin sufoki,  
per voĉo de l´ brava popolo  
aŭdu maljunan Nilon voki:

„Gefratoj riveroj, fremdlandaj koroj,  
vin mi ja vokas dum ĉi tiuj horoj.“  
- „Ni ĉiuj neniam ja forlasos vin-“  
asertas riveroj, „sole fidu nin!“

Vokas la Nilo:

„Giganta Gango, donu manon,  
Helpu Janceo, mia fratín!“  
- „Ni kun vi, ter de l'faraonoj,  
Ne devas tondro timigi vin.“

Vokas la Nilo:  
De l' granda Volgo aŭdeblas respondo,  
/tutmonde jam konata ties ondo/;  
„Nia amikec' eterna, por ĉiam!  
La amikojn mi forlasas neniam.“

Vokas la Nilo...  
Vi aŭdas promeson je la honoro  
de liberaj popoloj, ties koro.  
Se kuniĝas riveroj kiel anoj  
el ili maroj, grandaj oceanoj.  
En la universo kiu pli firmas?  
Tondras la ondoj. Do, kiu provokas?  
Ni patrolandon kontraŭ ĉiu ŝirmas!  
La Nilo vokas.

Esperantigis el rusa kata kano  
Rusa originalo aperis en Pravda /Moskvo/ la 28-an de novembro.

---

#### REGIONA LABORKUNVENO EN FRÝDEK.

Dimanĉe la 9-an de decembro 1956 okazis en urbo Frýdek regiona laborkunveno de regionoj Ostrava kaj Olomouc, kiun partoprenis 35 gesamideanoj el 17 lokoj. Priparolita estis la farita laboro por Esperanto dum 1956. La prezidanto de TKKE raportis pri la nuna situacio de la movado en Ĉeĥoslovakio kaj en la cetera mondo. Estis probita la laborplano de ventontaj laborkonferencoj en regionoj Ostrava kaj Olomouc dum la unua duonjaro 1957. La konferencoj laŭ ĝi okazos: La 20-an de januaro en Olomouc. La 10-an de marto en Havířov, la 7-an de aprilo en Frýdek, dum majo en urboj Jeseník aŭ Vsetín, dum junio Esperanto-seminario en Třinec kun tradicia ekskurso sur liman monton Ĉantorio, kie ni renkontiĝos kun polaj gesamideanoj.

VS.

--

#### NOVA LERNOLIBRO DE ESPERANTO APERIS EN POLLANDO.

Edward Janicki: Gramatyka i słowniczek języka międzynarodowego Esperanto, Lublin 1956, Związek Esperantystów – 12000 ekzempleroj, 109 paĝoj.

Hr.

--

JULIO BAGHY sendis al ni siajn salutojn el Varsovio kaj anoncis, ke la 23-an de decembro li revojaĝas Budapeston. El la hungara ĉefurbo sendas siajn salutojn al multaj geamikoj en Ĉeĥoslovakio kaj en la cetera mondo kontata porpaca laboranto s-ano Paŭlo Balkányi.

TKKE: Al ĉiuj gesamideanoj kaj amikoj de Esperanto deziras la estraro de TKKE-ĈSR feliĉan Novan jaron 1957! Ni dankas por via valora kunlaboro kaj por via oferta helpo kaj kune kun vi ni ĉiuj esperas, ke la jaro 1957 – alportos al ni novajn sukcesojn.

Josef Vítek, prezidanto

Miloš Rudolf, sekretario

Prezidanto de TKKE eluzante la tradician Laborkonferencon de E-rondetoj el regionoj Ostrava-Olomouc, aranĝotan de E-rondeto ĉe Dům osvěty en Olomouc, kunvokas por dimanĉo la 20-an de januaro 1957 /9,00 h/ TKKE-komitatanon en Olomouc por pridiskuti aktualajn problemojn kaj laborplanon de TKKE. Eluzu la 50%-an fervojrabaton kaj anoncu poŝtrevene vian partoprenon al s-ano J. Karhan, Olomouc, Na hradě 2. Ĝis la revido!

Ĉar probable ne ĉiuj komitatanoj partoprenos la traktadojn en Olomouc, la prezidanto kunvokas en Praha loĝantajn komitatanojn al speciala kunsido merkrede la 23-an de januaro je la 19-a horo en la klubejo de EKP.

Josef Víte, prezidanto.

---

ĴUS ATINGIS NIN DU DOLORAJ SCIIGOJ:

Longjara meritplena membro de Esperantista Klubo en Praha kaj gvidanto de nia movado en la regiono de Karlovy Vary

MUDr František V A N Ě K m o r t i s

la 6-an de januaro en Praha en aĝo de 73 jaroj. Kremacio okazos la 10-an de januaro je la 12,30 horo en Strašnice. Pluraj geamikoj por la lasta fojo adiaŭis la noblan viron! La familianoj akceptu nian plej profundan kondolencon!

EKP

-

Kun profunda doloro ni informas, ke la 8-an de januaro 1957 matene subite mortis senlaca pacbatalinto, ĝojdisdoninto kaj por infanoj kaj por plenkreskuloj profesoro, nacia artisto JOSEF S K U P A /nask. la 16-an de januaro 1902 en Strakonice/, viviginto de mondfamaj marionetoj Spejbl kaj Hurvínek, por kiu ambaŭ li parolis.

Li tiom meritis pri marioneta teatro, ke ĉeĥoslovaka registaro honorigis lin en la jaro 1948 per la titolo de Nacia Artisto.

Malmultaj eble scias, ke prof. Skupa dum la jaroj ĉirkaŭ 1949 kaj pli poste pristudis eblecon enkonduki Esperanton en sia teatro per celoj de vojaĝado eksterlande. Nur la konataj kontribuajoj al lingvistiko kaj propra sanstato ne permesis efektiviĝi ĉi intencon.

Honoru lian memoron per suprenlevitaj ambaŭ manoj laŭ via kutimo, samideanoj-marionetistoj kaj ĉiuj marionetistoj tutmonde. Konsenton esprimu al la vidvino Jiřina Skupová kaj al teatra kolektivo de Teatreto Spejbl kaj Hurvínek, Římská 45, Praha 12, Ĉeĥoslovakio.

J. Staněk

---

RAPORTO EL JABLONEC n. Nisou: En nova registaro hungara kiel financa ministro estas nia malnova amiko – esperantisto k-do KOSSA István. Ni tuj sendis al li bondeziron kaj hieraŭ /22.12./ li afable respondis al ni. Inter alie li skribas: ... nun nia movado fortiĝas, reviviĝas kaj mi esperas, ke mi ankaŭ reaktiviĝos.“

LP – Mir. Jíra

---

VERDA STANDARDO POR TKKE. La 20-an de januaro 1957 okaze de la XI-a tradicia Esperantista Laborkonferenco en Olomouc kaj de la 2-a datreveno de la fondiĝo de TKKE-ĈSR /la 9-an de januaro



1955/ estos transdonita al sekretario de TKKE kaj al prezidanto de E-rondeto Olomouc VERDA STANDARDO, donaco de ROH-Regiona Komitato de Sindikata Asocio en Olomouc. La standardo estas destinita por TKKE kaj estos deponita en Olomouc ĝis la Tutŝtata Esperanto-Konferenco.

TKKE

---

BELEGAJN GLUMARKOJN EN KVAR KOLOROJ /SKE DOKSY/, 100 ekzempleroj po 6 Kĉs mendu ĉe s-ano František Pytloun, Jungmannova 29/I., Poděbrady, kie vi povas ankaŭ mendi la Bultenon de Asocio de Esperantistoj en Pollando.

---

Zájemci o učebnici Esperanta „Esperanto v 14 úlohách“ od E. V. Tvarožka, III. doplněné a opravené vydání, stran 44, cena Kĉs 5,- piŝte na adresu: s-ano E. V. Tvarožek, Martin, Hvězdoslavova 2/III.

---

**Praha-ek-1956-45-08**

BULTENO PRAHA 45 1956

- 08 -

EL LA LETERO DE s-ano J. DONNER el Frankfurt/M.: ... La Bulteno de EK-Praha enhavis tre malgajan informon pri la morto de la ŝatata d-ro St. Kamarýt. Mi elkore kondolencas al la E-Movado en ĈSR je tiu granda perdo. Kiel iama sekretario de la EA en ĈSR mi kelkajn jarojn laboris en la kadro de la nomita Asocio, kiun estris la foririnto. Mi estus tre danýma, se vi povus transdoni korajn salutojn al eminentuloj de la ĉeĥoslovaka Esp.-movado, S-anoj Kilián, Vondroušek, Pytloun, Ginz.---

---

KRAJSKÁ LIDOVÁ KNIHOVNA V OLOMOUCI vydala seznam v knihovně uložených esperantských knih, které si mohou zájemci půjčovati prostřednictvím svých okresních, místních nebo krajských knihoven. Seznam knih /cca 300 svazků/ zaŝle KLK /Olomouc, nám. Republiky 1/ zájemcům na požádání. Přiložte známku na odpověď. Ředitelství KLK projevilo při jednání s tajemníkem TKKE své pochopení a zájem o spolupráci s ĉeskoslovenskými esperantisty a je přesvědĉeno, že služeb knihovny bude jimi co nejvíce používán. Knihovna bude stále doplňována nákupem knih, které je možno získati. Žádáme proto samideány, kteří mohou ze svých knihoven odprodati esperantské knihy, aby je nabídli KLK-Olomouc.

---

PREPARU VIN POR LA JUNULARA FESTIVALO! Mi vokas vin en al nomo de la Esperantista Iniciativa Grupo de Moskva-Universitato Ĉi grupon ni organizis por la Festival-preparoj. Ĝi estas en konstanta kontakto kun la Moskva Festival-komitato. Ni volas kontakton kun vi pro interŝanĝi informojn rilate la festivalon. Kiel vi scias, la Festival-komitato metis en sian programon kunvenon de esperantista junularo. Tiu ĉi kunveno havos gravan signifon por la Esperanto-movado entute. Ni volas, ke ĝi plenplene sukcesu. Ni devas ĝin perfekte prepari kaj jam nun komenci la agadon pro tio. Unue ni bezonas raportojn kiel preparas sin vialanda esp.-junularo por viziti Moskvon Festivalon. Sciigu al ni, kiuj gek-doĵ intencas alveni helpojn ili de ni bezonas. Informu nin regule pri ĉiuj tiurilataj novaĵoj kaj same ankaŭ ni raportos al vi. Skribu al k-dino Ludmila BOKAREVA, Novopeŝĉanaja ul. 21, korp.1 kv.9, MOSKVA D-252, UdSSR.

EKP

---

ĴURNALISTOJ KAJ VERKISTOJ VOKATAJ. La terglobo ege ŝrumpiĝis post dua mondmilito kaj tre ofte ne plu sufiĉas la supovo de t. n. mondaj lingvoj por bona interkompreniĝo. Tempas jam montri ke eĉ por ĵurnalistoj kaj verkistoj povas Esperanto signifiĝi gravan helpon. Dum lasta Kopenhaga kongreso estis restarigita Tutmonda Esperanta Ĵurnalista Asocio, planta plifaciligi reciprokajn kontaktojn kaj interŝanĝon de informa materialo. Aliĝojn por TEĴA el ĈSR de ĵurnalistoj, eĉ amatoroj kaj de verkistoj kolektas Joĵko Stanĉek, redaktoro ĉe Novinářský studijní ústav, Stalinova 3, Praha XII. Problemo pri kotizpago estos solvita pli malfrue. Ankaŭ fremdlandajn ĵurnalistojn kaj verkistojn ni petas kontaktiĝi kun supremenciita s-ano, povanta havii al interesuloj aŭ serĉatajn artikolojn aŭ korespondemulojn.

-kast-

---

„DEMOKRATA ĴURNALISTO“ PRI TEĴA. En „Demokrata ĵurnalisto“, 12-a numero de decembro 1956, organo de Internacia Ĵurnalista Organizo, kies sekretario troviĝas en Opletalstrato 7, Praha II, Ĉeĥoslovakio, oni informas pri renovigo de TEĴA. La gazeto aperas en angla, franca, germana, hispana kaj rusa lingvoj. Bedaŭrinde eĉ ne unu versio estas senerara, pro kio, laŭ niaj sperte, kulpas la tradukantoj: plej ofte suferis sekretario de TEĴA s-ano G. N. Jepsen, kies nomo aŭ entute mankas, kiel en angla eldono aŭ estas malĝuste skribita kiel Jespen. Svedan adreson de TEĴA mencias nur franca eldono: Mariodalsgatan 9, Borås, Svedlando. Gravan eraron enhavas rusa ekzemplero, kiu surskribe parolas pri renovigo de Internacia asocio Esperantista, sen rimarko ke temas pri ĵurnalistoj.

Stk

---

ESPERANTO EN LA PROGRAMO DE CENTRA PREPARKOMITATO DE UNUECA KORPEKZERCA ORGANIZO EN ĈSR. Laŭ la inicato de s-ano F. Šolta el Běrunice apud Městec Králové la supre menciita preparkomitato enmetis kiel diskutpunkton enkondukon de Esperanto por internaciaj korpekzercaj rilatoj.

---

### **Praha-ek-1956-45-09**

BULTENO PRAHA 45 1956

- 09 -

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO siatempe iniciatis la gigantan PETSKRIBAN Kampanjon al Unuiĝintaj Nacioj, rezultantan je 16 350 212 subskriboj por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn. UEA estas en konsultaj rilatoj kun UNESKO. – UEA havas fakon kies nomo estas La Centro de Esploroj kaj Dokumentado. Ĝi sendas regule klasigitajn informojn pri la disvastiĝo de Esperanto al UNESKO, al la plej gravaj internaciaj organizaĵoj kaj al diversaj registaroj. Jam montriĝis, ke multaj akceptas tiujn informojn kun intereso kaj atendas ilin. FARIĜU MEMBRO DE UEA! La kotizoj: Membro kun jarlibro (MJ) pagas Kčs 25,- jare, ricevas la legitimacion, sendokuponaron kaj jarlibron en du partoj kun pli ol 2000 adresoj de UEA-delegitoj en tuta mondo. – Membro abonanto (MA) pagas Kčs 50,-, ricevas ĉion kiel MJ kaj brilan revuon ESPERANTO, kiu aperas po monate. Membro subtenanto (MS) pagas Kčs 75,-, per sia pli alta kotizo subtenas la Asocion kaj ricevas ĉion kiel MA. – Postulu aliĝilon de UEA Teritoria Oficejo por ĈSR, adreso: Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha I.

---

POPOLA UNIVERSITATO: Aldone ni anoncas la temon de MUDr Josef Černý el Litoměřice /la 13.2.1957/: Interesaj novaĵoj kaj novaj vojoj en la moderna medicino.

---

Atingis nin doloriga sciigo, ke nia amiko Vladimír Slaný el Ostrava perdis sian karan patron en lia 86a vivjaro. Nia laborema kaj kara samideano Vladimír akceptu profundan kunsenton de la klubestraro kaj anaro de EKP!

-!-!-!

-!-!-!

### **OBJEDNEJTE SI PROPAGAČNÍ FOLIE**

vydané pro potřebu náborové přípravy jarních kursů. Jsou vydány Letní kolejí esperanta v Doksech po dohodě s TKKE a za spoluúčasti Okresního domu osvěty v Doksech. Jako příloha k vlastnímu sdělení o pořádání kursu jsou vhodnou pomůckou k individuálnímu náboru, obsahující stručné informace o úspěších mezinárodního jazyka. Objednávka je učiněna zasláním příslušné částky platenkou na úč. č. 237 002-Státní spořitelně v Doksech směr. číslo 0603-1 – úč. č. 30001. 100 kusů Kčs 8 včetně výloh pošt. Objednávejte nejméně 25 kusů. Na velké objednávky platte poštovními známkami v dopise.

---

AL LA ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTISTARO: La estonaj esperantistoj deziras al la ĉeĥoslovakaj verdsteluloj, kiuj ĉiam senlace kaj senhalte laboris, multe da sukceso en la organiza laboro, per ke la esperanta movado, havanta en via lando firman kaj seriozan bazon, povu plene disvolviĝi kaj per tio helpi la progreson de Esperanto en aliaj landoj. En la nomo de estonaj esperantistoj gvidantino de la Esperanta sekcio E. Linnuse, sekretario H. Dresen.

TKKE

---

RAPIDA KRESKO DE ESPERANTO EN ESTONIO. En Tallinn nuntempe funkcias 30 Esperanto-kursoj kun pli ol 900 partoprenantoj. En Estonio nun lernas Esperanton 2000-2500 homoj proksimume en 50 grupoj. Ŝtata Literatura Centro jam akceptis manuskriptojn de Esperanto-vortaroj kaj lernolibro kun promeso eldoni ilin komence de 1957 /laŭ la raporto de s-ano Arne Munak/.

Gesamideanoj Henrik SEPPIK kaj lia edzino fartas bone, s-anino Helmi Dresen estis mortigita dum la milito de faŝistoj /laŭ la raporto de V. Saluste/.

LP & TKKE

---

ORA JUBILEO DE MILANA ESPERANTO GRUPO. De la 19-a de januaro ĝis la 9-a de februaro okazos ĉe la Milana Urba Biblioteko en Palaco Sormani la Unua Ekspozicio de la libro kaj de tutmonda Esperanto-gazetaro. La ekspozicio kolektos 300 librojn de la plej fama produkco de la moderna esp. literaturo kaj scienco de 40 nacioj: en la gazetara sekcio estos elmetita granda kolekto de esp.gazetoj kaj revuoj el la tuta mondo. La manifestacio estos aranĝita por Ora Jubileo de Milana Esperanto Grupo.

LP

---

KOREKTO DE ERAROJ. En nia Bulteno nro 42/43 sur pĝ 7 en artikolo „Societo sen profita celo“ legu ĝuste "moderaj prezoj" anstataŭ „mildaj prezoj“. Same en la 44-a nro ni erare informis pri Henri Barbusse, kiu ne prezidis honore la UK 1921 en Praha, sed ĝian kunsidon de laborista esperantistaro.

---

-kast-

### **Praha-ek-1956-45-10**

BULTENO PRAHA 45 1956

- 10 -

Jaroslav MAŘÍK: RESUMA HISTORIO DE LA ESPERANTO-MOVADO. En bruŝura formo, dense skribitaj 40 paĝoj, formato A4, multobligite eldonis Esperanto-Fako de Domo de Kulturo P. Bezruč en Opava por studceloj en Somera Esperantista Tendaro junulara en ĈSR. Pro malgranda eldonkvanto ĝenerale ne vendata. Mendebila en escepta okazo ĉe Jaroslav Kuzník, Rooseveltova 17, Opava kontraŭ 8 Kčs afrankite. Eldonita en 1956.

Tiu ĉi tre grava helpilo fine aperis. Ĝi enhavas ĉiujn necesajn dokumentojn el la historio ĝis 1955-a jaro kronologie. La plej serioze prilaborita materialo estas dividita je Antaŭparolo jak Fantoj; I-a parto: Laŭperioda resumo; IIa parto, kiu enhavas: Tutmondan movadon; Movadon en ĈSR; Junularan movadon en ĈSR. La bonega libro plene meritas esti eldonita prese por la plej vasta uzo de la esperantistaro enŝtata kaj tutmonda. La aŭtoro meritas nian laŭdon kaj dankojn!

Josef Vítek, TKKE

---

ŜI NE VOLAS PAGI /Steur Panban: Io el Esperantio, 1-a parto/. Solvon de la problemo, aperinta en 14-a nro de „Heroldo de Esperanto“ trovos ĉeĥoslovakaj esperantistoj en la lasta jarkolekto /1951/ de nia Esperantista sur paĝo 103. Atentaj legantoj de niaj Esperanto-gazetoj rememoru nun artikolon „La esperantista popolo“, represitan en nia ankoraŭ pli malnova revuo „La Progreso“ /junio 1927, pĝ 15/ kaj ili konsolu sin, ke similaj tipoj estis troveblaj ankaŭ inter esperantistoj ĉeĥoslovakaj.

O. G.

---

DANAJ FROMAĜOJ- 24-paĝa reklamlibro, kiun nur tre rare la esperantistaro vidas. Sur bonega papeo belegaj kaj spritplena, multkoloraj bildoj kaj teksto en perfekta lingvaĵo /dank'al s-anino M. Haud? bine kaj ŝia kursa kolektivo en Arhus /propagandas ĉiuspecajn fame bonajn danajn fromaĝojn. Eldonita okaze de la 41-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago 1956.

Jelč-

---

Sciigo de la redaktoro: Multaj kontribuajtoj ne trovis jam lokon en tiu ĉi numero. Speciale ni danke akceptis la kontribuan leteron de nia membrano Marie Ginzová el Izraelo. Al ŝi kaj ŝia edzo ni sendas niajn specialajn novjarsalutojn kun kora danko pro daŭra kunlaboro kun nia Bulteno! Ŝia tre interesa letero aperos en nia proksima numero. Same aperos ceteraj gravaj informoj de LP kaj de aliaj niaj informsendantoj. Por la unua fojo nia Bulteno aperas en la kvanto 2100 ekzempleroj, kiu estas nia maksimuma ebleco.

---

EL LA VIVO EN ĈEĤOSLOVAKIO...

OLOMOUC:

Esperantistaj rondetoj aranĝas en la tagoj 15.-20.1.1957 seminarion de Esperanto kun varia interesa programo. Dimanĉe la 20.1. solena laborkonferenco /kiel anoncote aliloke/ kun estrarkunveno de TKKE. Fervojrabato. Esp.rondeto ĉe Kulturdomo /prezidanto Dro V. Mohapl /kunvenas ĉiumarde en la klubejo de la urbodomo, Stalinstr. /19-21h./ Esp.rondeto de la Junularo ĉe RK-ROH Hosp.podniku /prezidanto B. Nevrlý/ kunvenas ĉiuĵaŭde en la pavilono en Smetanovy sady /18-21h./

PŘEROV:

Uzina esp.rondeto /ZK Přerovské strojírny n. p./ aranĝas Unuan Kulturvesperon la 12-an de januaro kun varia kultura programo.

ŽILINA:

ESPERANTISTA KLUBO ĉe Regiona kleriga domo. Bone funkcias kurso, kiun regule partoprenas 20-25 geklubanoj. Kunvenoj ĉiumerkrede 18-20,30 h. Propagando en tri montrofenestroj, esp.diapozitivoj en du kinejoj kaj en kultura kalendaro.

LP

TŘINEC, BYSTŘICE n. Olzou, KARVINÁ, OSTRAVA, HAVÍŘOV, FRÝDEK-MÍSTEK, DOLNÍ BLUDOVICE, DOLNÍ SUCHÁ, FRENŠTÁT p. Radh.:

En la tagoj 9.-15.12 entute 25 poresperantajn propagandajn prelegojn pri Skandinavio kun kolorfilmoj de Josef Víték vizitis pli ol 5000 interesuloj. Prelegserio aranĝita de s-anino Anna Milatová, Třinec.

HRADEC KRÁLOVÉ:

Similan prelegon de Jos.Víték la 20.12, aranĝitande EK vizitis 200 personoj.

ŽĎÁR NA SÁZAVOU:

Aranĝita vere sukcesa literatura vespero /14.12./ honore al L. L. Zamenhof – tago de esp.libro. Vizito 40 personoj.

**DOKSY kaj DUBÁ:**

Laŭ la sciigo estas en la fondstadio interesrondetoj. Kursoj sukcese prosperas.

**PLASY apud Kralovice:**

Esperantista rondeto vigle laboras.

**PRIBENIK, distr. Král. Chlumec:**

Nova rondeto ĉe Kleriga Kunularo. Ĉiulunde gramatikaj horoj, iujn partoprenas 6 anoj.

**BRNO:**

La 15-an de dec. Socena koncertvespero honore al la Majstro bonege sukcesis. Artgvidinto prof. V. Scheiber. Kursoj daŭras, kluba vivo tre viglas.

**LIBEREC:**

La klubo kunvenadas regule ĉiumerkrede. Al kurso, kvankam la propagando estis granda, aliĝis nur 7 personoj. Instruas Sláva Pytloun. Estas intenco aranĝi regionan kunvenon. Najbaraj kaj ceteraj lokoj venu tiurilate en kontakton kun s-ano Sláva Pytloun /adr.: Agroprojekt, pobočka Moskevská 14, Liberec/.

**OSTRAVA:**

En la ekspozicio de interesrondetoj ĉe VŽKG partoprenas kunzite ankaŭ esperantistaj rondetoj en Ostrava. La 97-a naskiĝtago de L. L. Zamenhof solene festita en Kultura domo de tramistoj /partopreno 50 personoj/.

**BANSKÁ ŠTIAVNICA:**

Nova Esperantista rondeto ĉe Ĥemia lernejo estis fondita la 23-an de novembro 1956 dank'al fervoja kaj diligenta penado de samideano František Zöld. Tuj en la unuaj tagoj aliĝis al la rondeto 46 anoj! Kurson gvidas prezidanto de la rondeto s-ano F. Zöld. Sinceran bondeziron pri multaj sukcesoj.

**MLADÁ BOLESLAV:**

La vivo esperantista revigliĝas dank'al s-ano Karel Šolc, kiu gvidas novan kurson.

**NÁCHOD:**

Esperanto-rondeto ĉe Kultura klubo de fabriko MEZ. N. e. en Náchod aranĝis la 2.X.1956 novan, jam la kvaran kurson de Esperanto, kiun vizitas diligente 28 interesuloj. La 24-an de novembro okazis en Kultura klubo de MEZ sukcesa Esp.amuzvespero.

**PRAHA:**

Kvar kursoj bone prosperas, pluraj privatuloj denove interesiĝas pri printempa kurso, kiu estas planata. S-ano Josef Forman, per TKKE komisiita kolektanto de gazetinformoj pri nia movado kore dankas al tre multaj samideanoj, kiuj dum la pasintjaro alsendis ĉiujn pressciigojn al li, ĉar estas nepre necese laŭeble havi kompletan kolekton. Lia adreso: Josef Forman, Madridská 22, Praha XIII.

**BŘEZÍ U MIKULOVA:**

Fondita interesrondeto de Esperanto, gvidas Bedřich Hübner. Ni gratulas.

**PLZEŇ:**

Post penado de pluraj samideanoj troviĝas espero, ke en proksima tempo estos fondita Esp.rondeto ĉe Uzinklubo de Lenin-fabriko.

**DOLNÍ BLUDOVICE:**

Interesrondeto de lernejinĉanoj en la 8jara mezlernejo tre bone prosperas sub gvido de sperta s-ano O. Swetter. La infanojn vizitis kaj prelegis al ili s-ano J. Vitek.

**TŘINEC:**

Kurso, kiun vizitas 18 interesuloj estas sperte gvidata de s-anino A. Milatová. Ĉiun helpon /belegan klubojn ktp./ donas la Uzinklubo de la ferfabriko de V. Molotov en Třinec.

KANTU DUM VIAJ KLUBAJ VESPEROJ!!!

Lernu en januaro: A m o , j u n a a m o !!!

Amo, juna amo  
kie ni vin prenas?  
Montoj vin ne naskas,  
homoj vin ne semas.

Amo, juna amo,  
foje mi vin ĝuis,  
sed al mia mano  
longe vi forfluis.

Se vi, juna amo,  
sur montar'ekzistus,  
serĉi mi vin irus,  
mi la vivon riskus.

Esperantigis T. Pumpr

- - -

ĈU VI HAZARDE HAVAS FRANCLINGVAN LERNOLIBRON DE ESPERANTO? SENDU ĜIN DONACE AL NIAJ SAMIDEANOJ EN VIETNAMIO, KIUJ URĜE BEZONAS TIAN HELPON DUM SIA PORESPERANTA LABORO.  
ADRESO: s-ano NGUYÉN-VAN KINH, N. 3 THUY KHUẾ, H A N Ó I, Vietnamio.

- - -

Lernu en februaro: Sub nia fenestreto  
Pod tým naším okenečkom

Sub la nia fenestreto granda frosta bloví,  
pro la akvomank' minacas al ni katastrof',  
prenos mi la hakileton kaj trahakos la puteton  
tuj en nia puto venos forta akta-mov'.

Sub la nia fenestreto bela roza flor',  
diru, amatino, kial premas vin dolor'?  
Min doloro eĉ ne premas, sole mia koro tremas  
min atakas plor'.

Sub la nia fenestrato blanka liliet',  
diru amatino, kia via societ'?  
Min viziti ne kutimas la junuloj, ili timas,  
ĉar junulo ĉiu timas: Estas mi prolet'!

Esperantigis D-ro J. Fousek

---

**KORESPONDI DEZIRAS:**

36 gelernantoj de mezteknika radio-lernejo deziras korespondi kun radio-teknikistoj el ĉiuj landoj, interŝanĝi radio-teknikan literaturon, skribi pri kulturo, vivmaniero ktp. Ni respondos aŭ kolektive aŭ individue kun juna flamo.

Adreso: T. P. učilište – klaso II“v“, strato „Lavele“ 1, Sofia-35, BULGARIO.

-

Junulara klubo en Archangelsk /ĉe bordo de Blanka Maro/, kies membroj estas studentoj de pedagogia, medicina kaj arbar-teknika institutoj, deziras ligi kontakton kun tutmonda junularo. Skribu al: MOLODEŬNIJ KLUB, Gorkom VLKSM, ARCHANGELSK, Sovjet-Unio.

LP

Sudentino interesiĝas pri kulturo, vivmaniero, muziko, teatro. Kiu skribos al ŝi? Adreso: S-anino Gurinoj Olga, Frunzo 146-16 KUJBYŜEV, Sovjet-Unio.

-

Kdo si chce dopisovat se samideány ze sovětského Estonska, nechť pošle svou adresu s-anu M. Lukášovi do Hradce Králové 2, Bezručova ul. 853. Uved'te své zaměstnání, záliby atd.

-

Du lernejoj deziras interŝanĝi leterojn ktp kun eksterlandaj lernejoj. Skribu al Mittelschule Kötzschenbroda /Mezgrada lernejo/, Harmoniestr., RADEBEUL II, Grundschule Oberort, Pionier-Gruppe, RADEBEUL-OBERORT, DDR.

-

Estona samideanino, 27-jara instruistino de geografio deziras korespondadi kun ĉeĥoslovakaj samideanoj. Adreso: F-ino Ilme Putsepp, TALLINN, str. Nõmme34-1, Estona SSR – Sovjet-Unio.

-

Pri ĉiuj temoj interesiĝas s-ano Jerzy Biliński, ul. Grunwaldska 6 m 3, BRODNICA, woj.bydgoskie, POLLANDO

-

15-jara mezlerneja Levanto interesiĝanta pri literaturo, teatro, kino, moderna dancmuziko, deziras korespondi kun 14-16jara samideanino. Adreso: Paul RUIININO, Pärnu-strato 23-5, TALLIN, Estona SSR, Sovjet-Unio.

-

15-jara ĉeĥa studento volonte korespondos kun junaj homo jel tutmondo:  
Sáša AMBROŽ, Trojická 1, PRAHA II. ĈEĤOSLOVAKIO.

Tri fratoj 12-11-9jaraj deziras interŝanĝi bildkartojn kun samaĝuloj de la tuta mondo. Adreso: Kajo, Jirko, Petro Lukášek, Kmetiněves 12, p. HOSPOZÍN, ĈEĤOSLOVAKIO.

-

-----  
BULTENO, informilo de Esperantista klubo ĉe OB2 en Praha; aperas laŭbezone.  
Respondeca redaktoro: Josef Víttek, Jungmannova 24, Praha II. /tel. 238323/.  
Prezidanto de la Klubo: Jar. Šustr, Dlouhá 10, Praha I. /tel. 63464/.